## Redakta noto

Laŭ nia Statuto (§ 4.3) samfakaj membroj povas formi fakan sekcion, celante pli efikan fakan laboron kadre de ISAE. La Regularo (§ 4.3) plue informas, ke faka sekcio rajtas aperigi propran periodaĵon aŭ prizorgi materialon por publikigo en la asocia organo de ISAE. Laŭeble la faksekcio organizu kunvenojn aŭ partoprenu en neesperantistaj sciencaj kongresoj.

Kia eblo por faka agado! Kia eblo, raporti el samfakaj scikampoj en *Scienca Revuo* aŭ eĉ en proprafaka fak-periodaĵo!

Sed – kie estas la fakaj sekcioj ene de ISAE, kies estroj ja estas laŭstatute (§ 5.2.1) membroj de la ISAE-komitato kaj, pro tio, havas eĉ gvidan funkcion en nia Asocio? La sola samfakula organizaĵo, kiu aktivas enkadre de ISAE kiel "Geologia Sekcio de Internacia Scienca Asocio Esperantista (GS-ISAE)" estas tiu de la geologoj. Tiuj aranĝis proprafakajn kunvenojn kaj eldonis ok proprafakajn kajerojn sub la nomo "**Geologio Internacia**" (GI-1 ĝis GI-8, de 1968 ĝis 1990).

*Scienca Revuo* daŭrigis la kolekton de geologiaj fakartikoloj kiel GI-9 (SR 4/2001), kaj per tio realigis la petojn, ja eĉ postulojn, de kelkaj legantoj, ke ISAE de tempo al tempo eldonu pure "unufakan revuon". Ankaŭ mi tiam esperis kaj treege deziris ke aliaj fakgrupoj sekvu tian bonan ekzemplon kaj kunlabore produktu sufiĉe da manuskriptoj el samaj aŭ parencaj sciencaj sciadkampoj por kompili unufakan SR-kajeron. Post longa atendado fine sukceso – jen: interparolis bestkuracistoj kaj decidis plenigi sciencrevuan kajeron kun veterinaraj temoj! Ĉu tio estas la ekesto de "Bestkuracista Sekcio kadre de Internacia Scienca Asocio Esperantisto (BS-ISAE)"? Ĉu tiu ĉi SR 4/2005 estas la unua kajero "Veterinarmedicino Internacia", do VI-I? Ĉu jes, ĉu ne – tio ne vere estas la demando. La demando estas, ĉu aliaj samfakuloj decidos, post trafoliumado de tiu ĉi bestkuracista kunlaboraĵo, fari la samon pri sia(j) propra(j) fakkampo(j)!

Okazaj unufaktemaj esperantlingvaj SR-kajeroj helpas interalie

- pluevoluigi specialfakan (fak)lingvon por bezono scienca,
- pristudi problemojn de la nuna faklingvaĵo por fakaj publikigaĵoj,
- interkolege diskuti faklingvajn konceptojn kaj sciencajn normojn,
- kunlabore verki resp. kompletigi fakvortaron, helpe de samfakuloj.

Mi deziras al la legantoj de *Scienca Revuo* distran legadon pri veterinarmedicinaj temoj – kaj forte esperas, ke alifakuloj sekvos tiun ĉi ekzemplon en siaj propraj fakoj! *Prof. D-ro R. Sachs*, prezidanto de ISAE



# Pri universitataj titoloj ĝenerale kaj *Dr. med. vet.* speciale

*Wulfried* WINKENWERDER*

### Antaŭparolo

Doktoro = latinlingve: instruisto, plej alta universitata akademia diplomo (pli frue egale al "docento")

Promocio = altiĝo al ofico, rango aŭ al pli alta universitata grado. La promocio estas pruvo kaj konfirmo pri la kapablo de memstara scienca laboro kaj propra esploro. Promocio nuntempe egalas al doktoriĝo.

Habilitiĝo = dokumentas pluan sciencan efikon post universitata studado kaj prezentadon de "habilitiĝ-laboro" prijuĝita de diversfaka scienca juĝantaro, kaj atestas la kvalifikon por elekto al profesora katedro.

### Enkonduko

La sciencaj doktorgradoj en Germanujo estas ŝtate protektataj. Por konfirmo de la legitima uzado en germanlingvaj landoj de Eŭropo, la laŭleĝe akirita scienca doktorgrado eniras la oficialajn dokumentojn (kiel ekz. Pasporto de Eŭropa Unio aŭ la Germana Legitimaĵo) kiel fiksa aldono al la familia nomo. Ĝi aperas en la familinoma rubriko mallongigite indikita kiel *Dr.* sen iu ajn informo pri la koncerna fakultat-aparteno aŭ speciala scienckampo kaj estas parto de la familia nomo.

### La akademiaj gradoj

Ĝis la fino de la 12-a jarcento oni uzis por instruistoj ĉe la universitatoj de Eŭropo samrange la notaciojn "magistro", "doktoro" kaj "sĥolastikisto". La universitatoj, latine *universitas magistrorum et scholarium*, t.e. la tuto de docentoj kaj studentoj (alegorie ankaŭ *alma mater*, t.e. donanto – kvazaŭ patrino – de spirita nutraĵo) estis tiam nomataj "Akademioj".

--------------

* Tiu ĉi prelego estas verkita (okaze de la 225-jariĝo de Veterinara Altlernejo Hanovro) honore al la tie ĉi promociitaj tajlandaj akirintoj de la akademia grado *Dr.med.vet.* el la ĝemela universitato *Kasetsart* en Tajlando (kun ties Veterinara Fakultato en *Bangkok*), kaj transdonita de la aŭtoro al kolego prof. d-ro *Rüdiger Sachs* omaĝe de ties "ora doktoriĝjubileo" (je la 15-a de julio 2005) por publikigo en Scienca Revuo.

La progresiga organizado de la mezepokaj eŭropaj universitatoj rezultigis en ties subdividon en la kvar klasikaj fakultatoj: nome la teologia, jura, medicina kaj filozofia (tiu ĉi lasta fontis el la iama "arta fakultato").

Por la estontaj docentoj ĉe tiuj fakultatoj estis enkondukita en la 13-a jarcento speciala doktorekzameno, post kies sukcesa trapaso la kandidato estis rajtigata docenti en la respektiva scienco de la koncerna universitato, kaj ankaŭ en la samaj fakultatoj ĉe aliaj universitatoj (latine *ius hinc et ubique docendi*).

Tiu ĉi doktoriĝa ekzameno konsistis el "parola ekzameno" (*rigorosum*) kaj "scienca disputado". Bazo de tiu disputo estas "disputverko", el kiu, en la 17-a jarcento, paŝon post paŝo estiĝis en la diversaj fakultatoj la "disertacio", t.e. inaŭgura verkado, tiel nomata "doktoriĝlaboro", por la akiro de doktora grado per "promocio".

La unuaj eŭropaj fakultatoj enkondukantaj la doktoriĝon kaj la promocion estis, en la jaro 1224, la jura fakultato ĉe la Universitato en *Bologna*, Italujo, kiel *Doctor legum* (pli poste *Dr. jur.*). Sekvis la medicina fakultato de la Universitato en *Paris*, Francujo, forme de *Doctor medicinae* (*Dr.med.*).

El tiu historia evoluo (ligite kun la koncerna docent-rajto resp. docentkompetenteco) klarigas sin ankaŭ, ke en speciala fako post orda promocia procedo akiritan doktorgradon (latine *doctor rite promotus*) oni nur unufoje povis gajni en la germanlingva Eŭropo.

Ĉirkaŭ la doktora promocio disvolviĝis, ekde la sĥolastika mezaĝa erao, tuta vico de multakostaj ceremonioj: ekz. transdono de la "doktor-diplomo" (promocia dokumento), doktora ĉapelo, kaj ankaŭ la "doktorkiso" pere de la "promotoro" (t.e. la dekano de la fakultato aŭ rektoro de la universitato aŭ alia scienca altlernejo aŭ de la "doktorpatro" (kiu kontrolis la sciencan verkadon), kaj la invito de ĉiuj membroj de la fakultata docentaro pere de la freŝpromociita doktoro por – same multakosta – "festena doktormanĝado".

Ekde la 17-a jarcento oni diferenciĝis en la germanlingvaj medicinaj fakultatoj la "docentantajn doktorojn" (latine *doctores legentes*, por kiuj, paŝon post paŝo, estis instalata speciala akademia dignorango, la "profesoro"), kaj la "doktoroj sen docenta devigo" (latine *doctores non legentes*) ĉe la koncerna fakutalto de la universitato.

Ekde la 19-a jarcento koncedis la klasikaj universitatoj kadre de la al universitatoj donitajn fondiĝprivilegiojn pri la promociadrajto, es-



ceptokaze ankaŭ doni la doktoran gradon *honoris causa*, do, kaŭze de honoro, pro specialaj sciencaj meritoj ene aŭ ekstere de la sciencaj altlernejoj, kiel ankaŭ por eksterordinaraj meritoj pro subteno de la sciencoj (t.n. *doctor per diploma*) kun la mallongigoj *Dr.jur.h.c.*, *Dr.theol.h.c.*, *Dr.med.h.c.* kaj *Dr.phil.h.c.*).

Por la kuracistoj studintaj medicinon, ĝenerale la promocio al *Dr.med.* sen docentdeviga enradikiĝis.

En la jaro 1754 ricevis, por la unua fojo, ina kuracisto la promocian diplomon por *Dr.med.* ĉe la medicina fakultato de la Universitato en *Halle*, Germanujo.

**Veterinarmedicina trejnado kaj doktoriĝo**

Sepdek jarojn post fondiĝo de la unuaj novepokaj eŭropaj "veterinarmedicinaj centroj" en Francujo, 1762 en *Lyon* kaj 1766 en *Alfort* (el tio rezultiĝis la eldiro "*la France le berceau de la Médecine Vétérinaire*", t.e. "Francujo estas la lulilo de la Veterinara Medicino") fondiĝis entute 19 veterinarmedicinaj instruejoj por la klerigado de bestkuracistoj en la unuopaj ŝtatoj de la "Sankta Romia Regno de Germanuja Nacieco" (resp. en la sekvanta "Germana Alianco") kaj en Svislando; tie tiam nomata "brutaraj kuracedukejoj" aŭ "porĉevalaj institutoj".

De tiuj tiam 19 veterinarmedicinaj trejnejoj postrestis en la nuntempe germanparolanta Eŭropo nur 8 (Germanujo: *Hannover, Giessen, Berlin, München, Leipzig*; Aŭstrujo: *Wien*; Svisujo: *Bern, Zürich*). La akademiaj instrufakoj de tiuj bestkuracad-lernejoj nomiĝis, inter la latinlingvaj eruditoj, "*ars veterinara*" (t.e. arto pri best- aŭ brutkuracado), eble apogante sin sur la 1797 en *Leipzig* eldonita (kaj en la novgermanan lingvon tradukita) 4-voluma "*Ars veterinara*" de la lasta alte klera "bestkuracanto de la Romia Antikveco", iu *Publius Vegetius Renatus* el *Volterra*, Italujo.

Ankaŭ en la ceteraj faklingvoj de la tiutempa akademia medicino la nocio "*ars*" (t.e. arto) estis uzata por iuj sferoj de la "tutaĵo de la medicino", ekz. vundkurac-arto aŭ akuŝig-arto. En la jaroj 1815 kaj 1817 ricevis promocie 1 kuracistino la diplomon por iu "*arte obstetrica*" pere de la medicina fakultato de la Universitato *Giessen*.

Por veterinaroj en la 19-a jarcento eblis nur ĉe tre malmultaj akademiejoj akiri la sciencan doktorgradon pri veterinarmedicino. Sed kandidatoj ankaŭ povis akiri sciencan doktorgradon post plua studado


QUOD FELIX FAUSTUMQUE SIT
AUSPICIIS SUMMIS
SERENISSIMI PRINCIPIS ET DOMINI NOSTRI CLEMENTISSIMI
DOMINI
FRIDERICI FRANCISCI
MAGNI DUCIS MEGAPOLITANI
PRINCIPIS VENEDORUM SUERINI ET RACEBURGI
TERRAE ROSTOCHIENSIS ET STARGARDIENSIS DOMINI
UNIVERSITATIS HUIUS LITERARIAE PATRONI MUNIFICENTISSIMI
ATQUE CANCELLARII MAGNIFICENTISSIMI
RECTORE ACADEMIAE MAGNIFICO
CAROLO FRIDERICO AUGUSTO FRITZSCHE
PHILOSOPHIAE ET THEOLOGIAE DOCTORE UTRIUSQUE PROFESSORE PUBLICO ORDINARIO
VIRUM PRAENOBILISSIMUM
CAROLUM IACOBUM FRIDERICUM GILLMEISTER
MEGAPOLITANUM
POSTQUAM EXAMEN RIGOROSUM CUM LAUDE SUSTINUERAT ET DISSERTATIONEM INAUGURALEM
EXHIBUERAT
SUMMOS IN MEDICINA VETERINARIA HONORES
ET
DIGNITATEM AC PRIVILEGIA DOCTORIS MEDICINAE VETERINARIAE
RITE LEGITIMEQUE CONSECUTUM ESSE
MANIFESTUM FACIT ET CONFIRMAT
AD HUNC ACTUM CLEMENTISSIME CONSTITUTUS PROCANCELLARIUS ET PROMOTOR
HENRICUS HELMERICUS LUDOVICUS SPITTA
MEDICINAE DOCTOR ET PROFESSOR PUBLICUS ORDINARIUS
MAGNO DUCI REGNANTI A CONSILIIS MEDICIS SUPREMIS
COLLEGII CUI RES MEDICINALES A SERENISSIMO PRINCIPE COMMISSAE SUNT MEMBRUM ORDINARIUM
COMPLURIUM SOCIETATUM LITERARIARUM SODALIS ET ORDINARIIS ET PER LITERAS CONIUNCTUS
FACULTATIS MEDICAE H. T. DECANUS.
P. P. ROSTOCHII SUB SIGILLO ORDINIS MEDICI
DIE XXX. M. IUNII A. MDCCCXXXIV.
TYPIS ADLERIANIS.


**Bildo 1** : Promocia diplomo en la latina lingvo de la unua regulara promocio al *Dr.med.vet.* (Universitato *Rostock*, 1834)

kaj denova disertado por iĝi *"Dr.phil."* ĉe iu filozofia universitato – aŭ laŭ la tre esceptokaza vojo post speciale severa fakultata ekzameno kaj prezentado de elstara disertacio gajni memstaran *Dr.med.* de iu medicina fakultato.



La supre menciitaj malmultaj lokoj kun la eblo akiri sciencan *Dr.med.* estis ekz. la Medicina Fakultato de Universitato *Marburg* (konekse kun bestkuracad-edukejo). Tie okazis en la periodo inter 1788 kaj 1887 (nome en 1821) promocio de veterinaro post prezentado de doktoriĝtezo al "Doktoro pri bestkuracado" (*Doktor der Tierheilkunde*) kaj en 1827 okazis honora promocio de Regiona Veterinaro el *Oldenburg*, Germanujo, konata pro multaj publikigaĵoj kaj memorandoj, al "Doktoro de veterinara medicino honorkaŭza", okaze de la 300-jariĝo de la Universitato *Marburg*.

La Medicina Fakultato de la Universitato *Rostock* kunlabore kun (inter 1811 kaj 1843 ekzistanta) bestkuracad-edukejo en *Schwerin*, kie


Ex decreto
GRATIOSI MEDICORUM ORDINIS
RECTORE SENATUS ACADEMICI NOMINE ADSENTIENTE
promotor rite constitutus
GUSTAVUS ADOLPHUS WERNHER
medicinae et philosophiae doctor chirurgiae professor publicus ordinarius ordinis hassiaci philippi magnanimi pro meritis eques magno duci hassiae a consiliis rerum medicinalium sanctioribus nosocomii academici praefectus et clinici chirurgici director
viro nobilissimo atque experientissimo
IOHANNI GEORGIO PFLUG
de arte veterinaria optime merito
professori publico ordinario honorario in alma academia gissensi
SUMMOS DOCTORIS IN MEDICINA VETERINARIA HONORES
et quascunque
immunitates praerogativas iura ac privilegia
iisdem annexa
HONORIS CAUSA
hodie contulit
in fidem rei gestae
p. p. d. VI. martii MDCCCLXVIII
sub sigillo academiae maiore
Gissae typis officinae bruehlianae academica
(Fr. Chr. Pietsch).

**Bildo 2** : Unu el la unuaj latinlingvaj promoci-diplomoj al *Dr.med.vet. honoris causa* (Universitato *Giessen*, 1868)

promociiĝis po 1 veterinaro en 1829, 1830 kaj 1831 – certe post prezentado de la necesa disertacio – al "*doctor artis veterinariae*". En la jaro 1834 por la unua fojo promociiĝis plua veterinaro (post disertacia verkaĵo pri la influenco ĉe la ĉevalo) al *Doctor medicinae veterinariae,* mallongigite *Dr.med.vet.* – do la unua mencio de tiu titolo.

La medicina fakultato de Universitato *Giessen* (kun "sekcio pri bestkuracado" respektive "veterinara instituto") ekde 1832 promociis maturajn veterinarojn kiel "*Doctor in arte veterinaria* ", poste kiel *Doctor medicinae et chirurgiae veterinariae* (ekde 1858 kun deviga prezentado de disertacio) resp. kiel *Doctor in medicina, chirurgia et arte obstetrica veterinariae*, kaj fine, ekde 1900, kiel *Doctor medicinae veterinariae*, t.e. la hodiaŭa *Dr.med.vet.*

Ĝis la jaro 1907 la veterinaraj promociaj dokumentoj (kaj same tiuj de la aliaj sciencaj fakkampoj) en Germanujo estis ekskluzive skribitaj en la latina lingvo, post 1907 en la germana lingvo. La latina lingvo ja estis ekde la "eŭropa universitata vivo" la unueca lingvo de la klerularo. Sekve ankaŭ la kvalifika indiko de la sciencaj kompetentecoj montriĝis, por longa tempo, en la latinlingva formo por esprimi la kvaliton de ekzameno: *rite* = sukcesa trapaso, *cum laude* = bona, *magna cum laude* = tre bona kaj *summa cum laude* = elstare bona trapaso.


Pluaj ekzemploj por la ĝis nuntempe daŭranta pruntoj el la latina lingvo en la universitataj sferoj estas la nocioj "*Magnifizenz*" (lat. *magnificentia*), t.e. la alparolnomo de rektoro de iu universitato aŭ alia scienca altlernejo, "*Spektabilitaet*" (lat. *spectabilitas*), t.e. la alparolo de fakultata dekano, *stud.med.vet. (studiosus medicinae veterinariae*, t.e. studento de veterinarmedicino dum la unuaj semestroj) kaj *cand.med.vet.* (*candidatus medicinae veterinariae*, t.e. studento de veterinarmedicino post akiro de la *tentamen physicus*, t.e. la atesto pri sukcesa paso tra la veterinara antaŭekzameno).

Estas interese, ke la nocioj *medicina veterinaria* por la fako kaj *medicus veterinarius* por la veterinaro mem jam estis uzataj en la 1-a jarcento de la antikva romia mondo. En la urbo *Bern*, Svisujo, la tiea veterinarmedicina edukejo (post enkorpiĝo de la veterinara fakultato en la universitaton) en 1900 ricevis la promocirajton kiel *Doctor medicinae veterinariae*, same kiel, ekde 1901, la veterinara edukejo en *Zürich.*

En *Wien*, Aŭstrujo, la Veterinara Altlernejo (hodiaŭ: Veterinara Universitato) akiris la promocirajton en 1908 kaj ĉe la veterinaraj altlernejoj en la aliaj eŭropaj ŝtatoj de la Germana Imperio ekde la jaro 1910 (nome *München* kaj *Berlin*, same kiel la aŭtonomaj "Veterinaraj Altlernejoj" en *Hannover* (kaj *Stuttgart* dum la periodo 1821 ĝis 1912).



En *Giessen*, la ekde 1830 ekzistanta promocirajto por la scienca veterinara doktorgrado estis transdonita en la jaro 1914 de la medicina fakultato (kun veterinara kolegio) al la tiam fondita aŭtonoma Veterinarmedicina Fakultato de la Universitato.


JUSTUS-LIEBIG-
UNIVERSITÄT
GIESSEN

DER FACHBEREICH VETERINÄRMEDIZIN
DER JUSTUS-LIEBIG-UNIVERSITÄT ZU GIESSEN

gedenkt des Tages, an dem die Veterinärmedizinische Fakultät der ehemaligen „Justus-Liebig-Hochschule" vor fünfzig Jahren

**Herrn Professor**
**Dr. med. vet. Rüdiger Sachs**

geboren am 13. August 1927 in Völkershausen, Kreis Eschwege

zum

Doktor der Veterinärmedizin

promoviert hat.

Aus Anlass dieses Jubiläums erneuert der Fachbereich dem hochgeachteten Kollegen in ehrender Würdigung seines beruflichen Wirkens das Diplom.

Gegeben zu Gießen unter dem Dekanat des Professors für Allgemeine Pathologie, Pathologische Anatomie und Histologie Dr. med. vet. Manfred Reinacher

Gießen, im Juli 2005

M. Reinacher
Der Dekan

**Bildo 3** : La nuntempa germanlingva "ora promoci-diplomo", renoviganta la *Dr.med.vet.*-titolon post 50 jaroj (Universitato *Giessen*, 2005)

La promociprocedo por *Dr. med. vet.* de la Veterinara Altlernejo *Dresden* ĝis ties translokado kiel "Veterinara Fakultato de la Universitato *Leipzig*", en la jaro 1923, estis ankoraŭ ekzekuciata de la Universitato Leipzig. En la jaro 1918 por la unua fojo veterinaro ĉe la Veterinara Altlernejo *Dresden* post disertaciado promociiĝis kiel *Dr.med.vet.* ĉe la Universitato *Leipzig*.

En kontinueco de la tradicio de la koncernaj medicinaj fakultatoj en la periodo antaŭ la 19-a jarcento, ankaŭ nuntempe la 50-jariĝo post akiro de la scienca promocio (kaj ricevo de la "doktorgrado") estas festata en akademia kadro kiel "ora doktoriĝ-jubileo". Tiel ekz. ĉe la Veterinara Altlernejo (TiHo) *Hannover* en la jaro 1963 (okaze de la centjariĝo de Monda Veterinar-Kongreso) la ora doktoriĝjubileo kun renovigo de la promocidiplomoj por tiuj portantoj de la *Dr.med.vet.*-titolo, kiuj surbaze de la promocirajto de 1910 estis promociitaj en 1913 kiel la unuaj al *Dr.med.vet.*

Ekde 1963 la honoriga akademia 50-jariĝceremonio okazas ĉiujare. Estas menciinde, ke fine de la pasinta jaro 2004 pasis 170 jaroj ekde la unua promocio de veterinaro laŭ *Dr med.vet.*, pasis 85 jaroj ekde la unua promocio de ina veterinaro laŭ *Dr.med.vet.* – kaj pasis ekzakte 177 jaroj, de kiam okazis la unua honora promocio de veterinaro.

### Ĉe sciencaj altlernejoj/universitatoj de Germanujo (DE), Aŭstrujo (AT) kaj Svisujo (CH) atingeblaj doktorgradoj:

*D.* = honorkaŭze akirita doktorgrado de "Evangelia Teologio" (AT)
*Dr.agr.* (*agronomiae*) = agronomio, agrikulturo (DE)
*Dr.disc.pol.* (*disciplinarum politicarum*) = sociologio (DE)
*Dr.e.h.* (honore), *Dr.E.h.*(pro honoro) = honordoktoro de Teĥnika Altlernejo aŭ Teĥnikaj Universitatoj (DE)
*Dr.forest.* (*rerum forestalium*) = forstmastrumado (DE)
*Dr.h.c.* (*honoris causa*) = Honora doktoro de universitato
*Dr.-Ing.* (inĝeniero) = inĝenieraj sciencoj (DE)
*Dr.iur.* / *Dr.jur.* (*iuris*) = jurscienco (DE, AT, CH)
*Dr.iur.can.* (*iuris canonici*) = eklezia juro (DE)
*Dr.iur.utr.* / *Dr.j.u.* (*iuris utriusque*) = ekstereklezia kaj eklezia juro (DE, CH)
*Dr.med.* (*medicinae*) = medicino (DE, CH)
*Dr.med.dent.* (*medicinae dentariae*) = dentokuracado (DE, CH)
*Dr.med.univ.* (*medicinae universae*) = kuracado (AT)
*Dr.med.vet.* (*medicinae veterinariae*) = veterinara medicino (DE, AT, CH)
*Dr.mont.* (*rerum montanarum*) = mineksplua do, minej-metalurgio (AT)



*Dr.nat.techn.* (*rerum naturalium technicarum*) = grundoscienco (AT)
*Dr.oec.* (*oeconomiae*) = ekonomio (CH)
*Dr.oec.publ.* (*oeconomiae publicae*) = politikscienco (DE, CH)
*Dr.oec.troph.* (*oecotrophologiae*) = mastrumado, nutrosciencoj (DE)
*Dr.pharm.* (*pharmaciae*) = farmacia scienco (CH)
*Dr.phil.* (*philosophiae*) = d-ro de la filozofia fakultato (DE, AT, CH)
*Dr.phil.fac.theol.* (*philosophiae facultatis theologicae*) = d-ro de filozofio de la teologia fakultato (AT)
*Dr.phil.nat.* (*philosophiae naturalis*) = d-ro de naturscienco ene de filozofia fakultato (DE, CH)
*Dr.rer.agr.* (*rerum agrarium*) = agrikulturo kaj grundscienco (DE)
*Dr.rer.comm.* (*rerum commercialium*) = komercscienco (AT)
*Dr.rer.forest.* (*rerum forestalium*) = forstscienco (DE)
*Dr.rer.hort.* (*rerum hortensiarum*) = hortikulturo (DE, AT, CH)
*Dr.rer.mont.* (*rerum montanarum*) = mineja scienco (DE, CH)
*Dr.rer.nat.* (*rerum naturalium*) = naturscienco (DE, AT, CH)
*Dr.rer.oec.* (*rerum oeconomicarum*) = ekonomiaj sciencoj (DE, AT)
*Dr.rer.oec.publ.* (*rerum oeconomicarum publicarum*) = ŝtatekonomio (DE)
*Dr.rer.pol.* (*rerum politicarum*) = ŝtatsocia ekonomio (DE, AT, CH)
*Dr.rer.publ.* (*rerum publicarum*) = administrada juro (CH)
*Dr.rer.sec.* (*rerum securitatis*) = sekurecteĥnikaj sciencoj (DE)
*Dr.rer.soc.oec.* (*rerum socialium oeconomicarumque*) = sociaj kaj ekonomiaj sciencoj (AT)
*Dr.sc.agr.* (*scientiarum agrarium*) = agrokulturmastrumadaj sciencoj (DE)
*Dr.sc.math.* / *Dr.scient.math.* (*scientiae mathematicae*) = matematiko
*Dr.sc.nat.* / *Dr.scient.nat.* (*scientiarum naturalium*) = naturscienco (CH)
*Dr.sc.pol.* (*scientiarum politicarum*) = ŝtata, sociala kaj ekonomia sciencoj (DE)
*Dr.sc.techn.* / *Dr.scient.techn.* (*scientiarum technicarum*) = teĥnikaj sciencoj (CH)
*Dr.techn.* (*technicae*) = teĥnikaj sciencoj (AT)
*Dr.theol.* (*theologiae*) = teologio (DE, AT, CH)
*Dr.troph.* (*trophologiae*) = nutraĵscienco (DE)


### Adreso de la aŭtoro

*Prof. Dr. Dr.h..c. W. Winkenwerder*
*Rehweg 17*
*DE – 26118 Friedrichsfehn* / GERMANIO


### Priaŭtora informo

La aŭtoro profesoriĝis ĉe Veterinara Altlernejo Hanovro, laborinte en la Instituto de Mikrobiologio, kaj poste estris, ĉe regiona registaro, ŝtatinstancan faksekcion pri veterinaraj aferoj kaj konsumantoprotektado. Ekde 1970 li kunlaboras kun la tajlanda registaro pri reciproka alĝustiĝo kun la veterinaraj normoj de Eŭropa Unio, docentas ĉe Veterinarfakultato *Bangkok*, zorgas pri la tajlandaj veterinaroj dum studado en Germanujo kaj ricevis, rekone de siaj meritoj, la prohonoran doktor-titolon.